

MAJSTRO, KE MI DENOVE VIDU! – Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Marko 10, 46-52

[Tiutempe], Kiam Jesuo foriris el Jeriĥo kun siaj disĉiploj kaj kun granda homamaso, iu blindulo estis "sidanta por almozo. Li nomiĝis Bartimeo, la filo de Timeo.

Aŭdinte, ke ĉeestas Jesuo, la Nazaretano, li ekkriis, dirante: „Jesuo, filo de Davido, kompatu min!“. Multaj riproĉis lin por ke li silentu, sed li des pli laŭte kriadis: „Filo de Davido, kompatu min!“

Jesuo haltis kaj diris: „Alvoku lin.“

Iuj alvokis la blindulon, kaj diris al li: „Kuraĝe, leviĝu! Li vokas vin.“

La blindulo ĵetis for sian mantelon, ekstaris kaj iris al Jesuo. Tiam Jesuo demandis: „Kion Mi faru por vi?“ La blindulo respondis: „Majstro, ke mi denove vidu!“

Jesuo diris al li: „Iru, via kredo vin savis!“

Tuj la blindulo denove vidis, kaj sekvis survoje Jesuon.

Ili *alvenis al Jeriĥo...* Jeriĥo estas la unua urbo konkerita de Josuo eniranta la promesitan landon, kaj nun ĝi estas urbo subpremata, el kiu oni eliru.

Ni estas pritraktantaj la evangelion de Marko, kiu ĉi tie prezentas la kontraŭdiron "havi orelojn kaj ne aŭdi, kiel la trian anoncon de sia pasiono.

En la posta epizodo, el la 10-a ĉapitro, montriĝas la blindo de tiuj disĉiploj. Ni atentu la evangeliiston *Kiam Jesuo foriris el Jeriĥo kun siaj disĉiploj kaj kun granda homamaso*. La verbo foriri estas uzata en la biblia libro Eliro, kiam la promtesista lando estis jam iĝinta lando de sklaveco.

Nun aperas nova rolanto, kiu nomiĝis *Bartimeo, filo de Timeo*. Estas stranga la duobla prezento, antaŭe greklingva, *la filo de Timeo*, kaj poste kiel *Bartimeo*, kiu ne estas persona nomo, sed en aramea lingvo signifas denove "la filo de Timeo". En greka lingvo Timeo signifas "honoro", do laŭvorta traduko povus esti "la honora". Kial tio? La evangeliisto per tiu ulo volas priskribi la du disĉiplojn, Jakobon kaj Johanon, kiuj ne estas nur surdaj, sed ankaŭ blindaj.

Jesuo, post la fiasko de sia prediko en la sinagogo de Nazareto, diris "Profeton oni senhonorigas nur en lia patrujo". Sed tial la disĉiploj postulas honoron. Kaj la filo de Timeo, Bartimeo, estas citita dufoje, ĉar Marko intencas emfazi, ke li parolas pri Jakobo kaj Johano, nomataj ankaŭ "la filoj de Zebedeo".

"Blindulo". Kaj jen aperas la akuzo de Jeremio". La vortoj "sidanta ĉe la vojo" memorigas tiujn de ĉapitro 4,15 en la parabolo de la semo ĵetita ĉe la strato, kaj poste manĝita de la birdoj, imago de satano, de la povo. La mesaĝo de Jesuo ne estas komprenita.

"por almozo. Aŭdinte, ke ĉeestas Jesuo, la Nazaretano, li ekkriis". Nazaretano estis iu venanta de la regiono de la revoluciuloj. Kaj li kriis precize kiel la demonulo en la sinagogo "Jesuo, filo de Davido, kompatu min!". Jen la kialo de lia blindeco: li ne vidas en Jesuo la filon de Dio, venanta pro amo por vivigi la mondon, sed la filon de Davido, kiu, per perforto, mortigo, detruo, konkeris la povon kaj fondis la regno de Izraelo.

Jen la signifo de la blindeco. La disĉiploj akompanas Jesuon, sed ne sekvas lin, ĉar en ilia menso estas la bildo de Mesio triumfanta, ĝuste la filo de Davido. "Multaj riproĉis lin... Tiuj estas la veraj sekvantoj de Jesuo, kiu volas liberigi la disĉiplojn de tiu eraro "por ke li silentu, sed li des pli laŭte kriadis: „Filo de Davido, kompatu min!". En tiu dua alvoko eĉ mankas la nomo Jesuo, restas nur la filo de Davido, restarigonta la reĝan povon.

"Jesuo haltis..." Jesuo ne iras al la blindulo, la blindulo iru al Jesuo. "kaj diris: „Alvoku lin."". la verbo "alvoki aperas trifoje, kio por la tiutempaj judoj

signifis "tute". Oni alvokas iun malpeoksiman, kiel malproksimaj estas la disĉiploj akompanantaj Jesuon, sed ne lin sekvantaj

Iuj alvokis la blindulon, kaj diris al li: „Kuraĝe, leviĝu! Li vokas vin.” La blindulo ĵetis for sian mantelon.... En simbola lingvo la mantelo estas la persono mem, la forĵeto de la mantelo montras, ke la bildo de la filo de Davido estas forgesita, ke okazis konvertiĝo, *“li ekstaris kaj iris al Jesuo”*. Ne iris Jesuo al la blindulo, la blindulo aliris Jesuon, kaj irinte reakiras la vidkapablon.

“Tiam Jesuo demandis: „ Kion Mi faru por vi?”. Por komprenigi, ke en ĉi tiu epizodo Marko aludas al Jakobo kaj Johano, li atribuas al Jesuo la samajn vortojn kaj la saman demandon antaŭe direktitajn en la lasta epizodo al tiuj du disĉiploj.

“La blindulo respondis: „Majstro, ke mi denove vidu. Fine li ne nomas lin filo de Davido, sed Majstro, voknomo tiam uzata alparolante Dion. Fakte li ne ĉiam estis blinda, iam dum sia vivo li kapablis vidi, sed tiun kapablon li perdis, ĉar li iĝis sklavo de ideologio kontraŭa al la Dia plano por la homaro.

Jesuo ne faris iun agon, por la blindulo, simple *“diris al li: „Iru, via kredo vin savis!”*. *Tuj la blindulo denove vidis, kaj sekvis survoje Jesuon”*,,. Tiu esprimo estis uzata por montri la konvertiĝon.